



BELGA KATOLIKO

Oficiala bulteno de la
BELGA KATOLIKA LIGO ESPERANTISTA

(B. K. L. E.)

Nacia Sekcio de la INTERNACIA KATOLIKA UNUIGO ESPERANTISTA

(I. K. U. E.)

DECEMBRO 1911

ENHAVO:

Conclusiones a conventu Approbatæ — Deziresprimoj aprobitaj de
l'Kongreso — Gravega Aprobo — La noktameza Meso — Rakonto —
Letero de l'Prezidanto de I. K. U. E. al S^{ro} Heidendal — Grava Avizo.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

ĉe LEO HEIDENDAL

A R E N D O N K

La Centra katolika Esperanta Oficejo

« ZAMENHOF »

AREN DON K



Akceptas mendojn por ĉiuj

Esperantaj libroj.

Vendas Esperantajn verkojn,
Gramatikojn, lerno kaj legolibrojn
Esperantistajn insignojn

k. t. p.

Kelkaj verkoj el la « Librejo »

Spirita Juvelaro	fr. 2.20
Katolika Preĝaro	fr. 2.60
La Kvar Evangelioj	fr. 1.60
Hebrea Kalendaro	fr. 0.50
Fabiola	fr. 3.80

k. t. pl.

Adresu ĉiujn mendojn al :

La Centra Katolika Esperanta Oficejo « Zamenhof »

AREN DON K


BELGA KATOLIKO

ORGANO DE

LA

Belga Katolika Ligo Esperantista
(B. K. L. E.)

REDAKCIO : Por ĉio kio koncernas la redakcion (artikoloj — informoj — broŝuroj — libroj — k.t.p.) oni sin turnu al:



NACIA SERĈO DE LA

Internacia

Katolika Unuiĝo Esperantista
(I. K. U. E.)

ADMINISTRACIO : Por ĉio kio koncernas la administracion (reklamoj — monsendoj — anoncoj — k.t.p.) oni sin turnu al:

Sro Leo Heidental, ARENDONK.

UNIO INTERNATIONALIS
CATHOLICO-ESPERANTISTARUM.

Secundus Internationalis Catholicorum Conventus

SUB BENEDICTIONE S. S. D. N. PI P. P. X ET
CUM APPROBATIONE ILLUSTRISSIMI PRAE-
SULIS CALLIER, EPISCOPI HAARLEMENSIS.

HABITUS HAGAE COMITIS (Nederlandia)
14-19 AUG. 1911.

Conclusiones a conventu Approb. e.

De Christianorum Reconciliatione. e.

Quam dilecti discedentes a nob. fratres plurimis in regionibus manifeste uniri magis magisque desiderant;

quum plurimis in regionibus, in Oriente praecipue, in Angliâ et in Americâ, horum multi consensum illum atque unitatem Christianorum absque Sanctae Sedis Romanae Apostolicae reconciliatione effici non posse, jam sint mente complexuri;

quum ex his, qui in hoc conventu dixerunt, nonnulli nobis communicarint in Angliâ et alibi inventi, qui, ut manifeste Sanctae Sedi non sint juncti, ita non tantum Petri Cathedram ex auctoritate divinâ Christianismi centrum agnoscant, verò etiam sodalitia fecerint, hoc consilio, ut orando mutuo-

INTERNACIA KATOLIKA
UNUIĜO ESPERANTISTA. (I. K. U. E.)

Dua Internacia Katolika kongreso

SUB LA BENO DE LIA PAPA MOŬTO, PIO XI
KAJ LA ADROBO DE LIA MOŬTO, MONSIN-
JERO CALLIER, EPISKOPO DE HAARLEM.

HAGO (Nederlando)
DE LA 14a-19a DE AUGUSTO 1911.

Deziresprimoj aprobitaj de l'kongreso.

La Reunuiĝo de la Kristanaro.

Ĉar la deziro por videbla unueco pli kaj pli sentigas ĉe niaj karaj apartigitaj gefratoj en diversaj landoj;

Ĉar, en multaj landoj, precipe en Oriento, en Anglujo kaj en Ameriko, multaj el ili ekkomprenas, ke la videbla unueco de la kristana Eklezio povas okazi nur per reunuiĝo kun la Sankta Apostola Roma Seĝo;

Ĉar kelkaj oratoroj sciigis nin, en tiu Kongreso, ke en Anglujo kaj aliloke ekzistas Kristanoj, ne en videbla komunio kun la Sankta Seĝo, kiuj ne nur konfesas ke la Petra Seĝo (Cathedra Petri) estas, per la Dia volo, la centro de la kristana unueco, sed kiuj eĉ fondis societojn, celantajn, per la preĝo kaj per reciprokaj interrilatoj, la

ventum Neapoli anno 1910 habitum, dato, se gaudere dixerit, quod iam bene erga Esperantistarum linguam essent affecti, seque tempus futurum prosperum fore huic linguae providere;

itaque:

Conventus hic applicare se exoptat ad utrumque conventum internationalem Neapoli et in Cairo habitum, atque ea repetere, quae in ii sin favorem caecorum in Esperantistarum linguâ erudicendorum sunt exoptata.

De Catholicis et de Pacificatione.

Quum môx probatum sit, Ecclesiam Catholicam ex doctrinâ divini sui Conditoris semper et ubique suam ducere pacem, amare eamque odio, superbiam ac vano sui amoris quae plerumque belli causae existunt semper adversari;

quum ille pacis amor verò patriae amor minime repugnet, huius e contrariò maxime admiranda sit proprietas;

quum ille pacis amor firmæ nobilitate voluntati minime laedat patriam ab omni injusto impetu defendendi;

quum, non obstante perpetuâ hâc sacrae nostrae Religionis traditione, adversarii impudenter contendere non desistant insanum istud, quod Ecclesia Catholica bello faveat, quinimo pro necessariâ omnium virtutum disciplinâ illud habeat;

itaque:

Conventus hic, utpote esperantistarum catholicorum, indeque alio tanto magis pacem fraternitatemque per totum terrarum orbem desiderans, exoptat, ut omnes Catholici re verâ pacis amorem prae se ferant, sublevando, in quantum poterunt, sodalitiâ pacis, maxime autem institutum illud, quod Iudicium Arbitrii nuncupatur, quodque id agit, ut pro bello arbitrium, sive pro rigore et vi rationabilis pactio justitiaeque habeatur;

Dolet, quod, obnitentibus nonnullis gubernatoribus acatholicis, Summus Pontifex, quo major potestas moralis in mundo non existat, usque nunc ad internationalem Pacis Consilium nondum formaliter est admissus.

ke Li antaŭvidas por Esperanto grandan estontecon:

Pro tio:

Ĉi tiu Kongreso deziras asociiĝi kun la du internaciaj Kongresoj de Napolo kaj Kairo, kaj ripeti la deziron de ili esprimatan por la instruado de Esperanto al blinduloj.

La Katolikoj kaj la Pacifismo.

Ĉar estas ĵus montrite, ke la katolika Eklezio, laŭ la instruo de sia Dia Fondinto, ĉie kaj ĉiam, starigis kiel devon la Pacamon, kaj ke ĝi ĉie kaj ĉiam kontraŭstatis malamon, malhumilecon, kaj egoismon (ofte kaŭzoj de militoj);

Ĉar tiu pacamo tute ne estas kontraŭa al la vera-patriotismo, sed ĉi estas unu el ĝiaj plej admirindaj ecoj;

Ĉar tiu pacamo tute ne estas kontraŭa al nobla decidemo protekti la patrujon kontraŭ ia ajn maljusta atako.

Ĉar, spite tiu konstanta tradicio de nia Dia religio, ni aj malamikoj senhonte subtenas la absurdan aserton, ke la katolika Eklezio favoras militadon, kiun ĝi eĉ konsideras kiel necesan instruadon de ĉiuj virtoj;

Pro tio:

Ĉi tiu Kongreso, konsistanta el katolikaj esperantistoj kaj, tial, duoble deziranta pacon kaj tutmondan fratecon,

Esprimas la deziron, ke ĉiuj katolikoj montri praktikan pacamon helpante laŭ sia eblo la pacasociojn kaj precipe la admirindan internacian Tribunalon en Hago, kies celo estas ĉiam anstataŭigi militadon per arbitracio, aŭ, en aliaj vortoj, anstataŭigi la regadon de bruta forto per la regado de racia diskutado kaj justeco;

Bedaŭras, ke pro la malhelpo de kelkaj malreligiaj registaroj, la Papo, kiu estas la plej granda potenco morala en la mondo, ne estis ĝis nun oficiale akceptata en la internaciaj konferencoj pri Paco.

De Esperantistarum linguâ et de
Peregrinatione.

Quum pateat, Esperantistas Catholicos vel iter faciendi causâ, vel operarios, vel magistros perigrinantes generatim offendere quidem faciliè Samideanoj (= Esperantistas), qui libenter iis praesto sint, ast non tam faciliè Samideanoj catholicos;

quum Catholicorum in exteris commorantium consuetudo inter fidei socios valde praeoptanda sit;

quum imprimis requiratur, ut vernaculae linguae ignari sacerdotes-esperantistas adire queant, quibus confiteantur et a quibus consilium necessarium vel solatium accipiant; itaque:

Conventus hic exoptat, ut hanc rem magni momenti efficaciter secum animo considerent, ita ut confestim liber componatur a moderatoribus ipsius I. K. U. E. per modum libri ipsius U. E. A., et in «*Espero Katolika*» promulgandus, continens nomina et locum domicilii omnium sacerdotum, qui confessiones audire Esperantistarum linguâ valeant, nomina insuper omnium societatum catholicarum ipsius U. I. C. E., nomina denique privatorum quoque Esperantistarum catholicorum, qui prompti sint in adjuvandis pro virili parte fidei sociis in exteris iter facientibus.

Gravega Aprobo

DE LIA EMINENTA MOŝTO KARDINALO MERCIER.

Abato Richardson, Prezidanto de I. K. U. E. sendis al Lia Kardinala Moŝto la «*Deziresprimojn*» balotitajn dum «*Nia Dua*» en la Hago. Je la dato 29 Oktobro, nia Prezidanto ricevis atablan leteron de Mgr Dewachter, Helpepiskopo kaj Vikario ĝenerala per kiu li sciigis ke La Kardinalo Mercier, ne nur plene aprobas la nomitajn Deziresprimojn latine kaj esperante verkitajn, sed plie, ke lia Eminentia Moŝto estas tute preta ekzameni la demandon: ĝis kiu grado estus eble doni, en Belgujo, praktikan efikon al tiuj deziresprimoj. La letero aldonis ke la Kar-

Esperanto kiel Helpilo por
Etmigruloj.

Ĉar estas evidente, ke, kvankam katolikaj Esperantistoj, vizitantaj fremdlandon kiel komercistoj, laboristoj aŭ instruistoj, ĝenerale facile renkontas samideanojn, kiuj volonte helpus ilin, ili tamen ofte malfacile trovas katolikajn samideanojn;

Ĉar estas tre dezirinde, ke Katolikoj en fremdlando interrilatu precipe kun siaj samreligianoj;

Ĉar, antaŭ ĉio, estas necese, se ili ne scias la nacian lingvon, ke ili konu la adresojn de Esperantistaj pastroj, ĉe kiuj ili povus iri por la konfeso, kaj por ricevi ian bezonatan konsilon aŭ konsolon;

Pro tio:

Ĉi tiu Kongreso esprimas la deziron, ke oni praktike okupu sin pri tiu grava punkto, tiamaniere, ke senprokraste estu starigata adresaro, simila je tiu de U. E. A. verkota de la estraro de I. K. U. E. kiel eble plej baldaŭ, kaj publikigota en «*Espero Katolika*», montranta la nomojn kaj adresojn de ĉiuj pastroj povantaj ricevi konfesojn en Esperanto, la nomojn de ĉiuj katolikaj grupoj de I. K. U. E., kaj eĉ la nomojn de privataj katolikaj Esperantistoj, kiuj konsentus helpi, lan eblo, siajn samreligianojn vojaĝantajn en fremdlando.

dinalo bevas niajn klopodojn, kaj esperas ke granda sukceso fine kronos ilin.

Ne estus necese ke ni klarigu al niaj legantoj la gravan naturon de tia aprobo de lia Princo de la Eklezio, precipe en tiu ĉi momento kiam la tuta katolikaro entuziasmas pri la mirinda Parolado de lia Kardinala Moŝto farita en Meaux okaze de la festoj starigitaj por honoro unu el la plej puraj gloroj de Francujo: Bossuet.

Sed nia devo estas nun ne permesi ke la ŝatindaj intencoj de la Kardinalo restu, pro nia kulpo, ne fruktdonantaj. Pro tio nia Prezidanto jam skribis al Lia Eminentia Moŝto ke oni proponis formi tiuj komitaton kies celo estos verki skemon submetotan al lia altaprobo, per kiu oni sugestus rimedojn

por doni praktikan efikon al ĉiu el la deziresprimoj balotitaj de la Haga Kongreso.

Ni petos niajn legantojn atente legi tiujn deziresprimojn, kiujn ni presigas latine kaj esperante, en tiu ĉi Bulleno, kaj ekzameni se ili ne povus eble helpi nian komitaton per taugaj sugestoj. Ke ili bonvolu sendi siajn ideojn al Abato Richardson, 121 rue du Marais, Bruselo.

Ni aldonas kelkajn sugestojn jam ricevitajn pri la unuaj deziresprimoj. La temo estas « La reunuigo de la Kristanaro ». La konkludo de la konsideroj estas la esprimo de la deziro ke la tutmondaj katolikoj sub la gvidado de la S^{ta} Seĝo kaj de la Episkoparo, klopodu per ĉiu rimedo al ili permesata de la Eklezia Aŭtoritatuloj, por kuraĝigi siajn karajn apartigitajn fratojn, kaj kunlabori kun ili en tiu tre ŝatinda movado « Sed kial? ĉu ni ne povus sugesti ekzemple, ke en la Seminarioj oni instruu la teologiajn studentojn pri la movado favora al unuigo kiu ekzistas en la Anglikana kaj Orientaj Eklezioj, ke ili lernu la diversajn punktojn kiuj nuntempe apartigos la kristanojn, kaj la plej bonajn rimedojn por konvinki la ne-katolikojn. Ofte tiu rimedo estas nur bone klarigi al ili niajn doktrinojn. Ofte nia longa disigo kaŭzis malbonankomprenon, ni ne plu donas la saman sencon al la samaj vortoj k.t.p. kaj ankaŭ ĉu oni ne povus servigi la pastrojn teologiajn revuojn, por pritrakti tiujn demandojn kaj fine inviti la pastraron, kaj per la pastraro la fidelulojn, sin interesi pri tiu nobla ideo: la unuigo de la tuta kristanaro por plenumi la deziregon de la Sankta Koro de Jesu » ke ekzistu nur unu Ŝafejo kaj unu Paŝtisto? Labori kaj precipe preĝi por tiu celo, jen, ja bona maniero doni praktikan efikon al la unuaj deziresprimoj de la Haga Kongreso. Nun ni invitas niajn legantojn, precipe la respektindajn Pastrojn, ekzameni la aliajn deziresprimojn kaj sugesti al ni rimedojn kiujn ni kuraĝus submeti al Lia Kardinala Moŝto.

« PACEMULO »

La noktomeza Meso.

Ĉiam min lasis indiferanta la belegeco de la noktomeza Mesoj en la grandaj urboj; kontraŭe, la kristnask-nokto ĉe la kamparo treege impresas min. El kie tio devenas? Pro kio nia kortuŝeco vekigas en l'antikvaj muroj de vilaĝa preĝejo, dum ĝi dormas en Parizo, malgraŭ la delikatega-lukso kaj la lertega scena farmaniero de la religia ceremoniaro. Ĉu, ĉar la simpla kaj naŭva elmonro de sincera kredo povas sola vibrigi ĵajn sentemajn korojn. Eble ankaŭ, tio devenas, ke la kampara preĝejo memorigas mian dekkvinjaran, aĝon kaj ke oni ĉiam pliamas la lokojn, kiuj vin reunigas?... Mi ne scias, sed mi ankoraŭ, kun feliĉo, gardas memoron, de Noktomeza Meso, aŭdita en malgranda paroĥo kaŝata en la laŭdinoj de Anĵuo.

Mi vidas la Dikoman placon kun ĝiaj ulnoj desegnantajn ĝiajn senfoliigitajn branĉojn sur la tute steligita ĉielo; mi aŭdas la bruegon de la lignaj ŝuoj kaj la tusadon sukaketantan de la fidelularo eniranta la navon, dum la lasta sono de la Meso, tintis en la seka kaj malvarma aero de Decembra nokto.

Ĉiuj urbetaj homoj estis tie, kaj ankaŭ la farmomastroj de la bienetoj tie ĉi kaj tie diskuŝantaj je du mejoj en la ĉirkaŭaĵo; la virinoj kun nigraj manteloj kaj blankaj kuloj, la knaboj kun novaj kaj rigidaj kitejoj, starigantaj kaj premigantaj sub la orgeno. Laŭ antikva kutimo, la komunuma paŝtisto malsupreniris sian ŝafejon alkondukante kun si la plej junan el siaj ŝafidoj, kiu dolĉe bleketis dum la « Introit ».

Preskaŭ malhela estis la navo kaj apenaŭ aperis la kapoj. Iafaje la lumaj radioj devenante de la vaks-kandeloj de l'ĉefaltaro eligis el la ombro maljunan plugistan vizagon aŭ ĉarman junulinan profilon. Malforta aroma parfumo suprenigis per dubebluaj helikformoj kaj miksigis kun la elspirafa vaporeto elfalanta el la fidelulara labioj en ĉi-tiu malvarmega vintra noktunveno.

Starigante antaŭ la librapogejo, la vikario legis la Sanktan Lukan Evangelion: « Ĉar estis tie, en la ĉirkaŭaĵo, paŝtistoj, kiuj

noktrestis ĉe la kamparo, gardante laŭvice siajn brutarojn. Subite, Sinjora angelo aperis apud ili.... kaj li, ekkantis per laŭta voĉo: « *Adeste, fideles, veajte, adoremus Dominum.* »

Kaj je tiu kanto de tiel naiva intimeco, de tiel antikva dolĉeco, ŝajnis al mi vidi tra la nokto, la ŝajmastraron deirantan al Betlehem' on por serĉi la Infano « *vindita per lukoj kaj huŝita en manĝujo.* » Mi aŭdis laŭhoron de liaj kampaj voĉoj: Gloro al Dio, en la plej altaj ĉieloj kaj paco sur tero al la bonvolemeccaj homoj!

Kaj tiu paŝtisto, tie, genufleksata kontraŭ kolono: kun sia ŝafido bleketanta en liaj brakoj igis min pensi al unu el tiuj Betlehem' aj brutgardistoj. Mi demandas min: ĉu mi ne estas tuj mistere vidonta malfremiganta unu el la muregoj de la navo kaj, je la stela lumeco, ĉu mi ne estas rigardonta kie dormas inter la bovo kaj lazeno, la dia Nov-Naskito, radia kiel suno?

SPERANZA.

RAKONTO.

Fratino « Maleno ».

La nomo de la bona fratino estas Magdalena, sed la infanetoj al kiuj ŝi instruas preĝon kaj alfabeton, ne pli aĝaj ol kvin jaroj, ŝin nomas « Maleno », vorto pli facile elparolebla per liaj malfertaj lipetoj ne ankoraŭ kutimitaj al malfacila elparolado.

Tiunometo « Maleno » tute naiva, plitaŭgas pli bone ol iu ajn al la juna monaĥino; kaj la monaĥinaro ĝin baldaŭ uzis senceremonie. Fratino Maleno estas malgranda infano; ŝia koro estas pli pura ol ŝia blanka kornforma kulo, kaj ŝiaj okuloj pli bluaj ol ŝia blua robo.

La direktoro de la monaĥinejo, antaŭe vilaĝa pastro, kun kapo glorkronata je blankaj haroj, konservis el sia longa vivo, meze de kamparaj, iam da pentrinda elparolado; li iam certigis al la superulino ke, en la koro de la Sankta ĉielino, regnas ĉiam « maja mateno », kaj ke en la animo de

fratino Maleno, Dio sin promenas kvazaŭ en sia propra ĝardeno.

Tiu granda infano estas feliĉa lernigi la malgrandulojn, precipe hodiaŭan, 24^{an} de decembro.

Dum la tagmanĝo la superulino permesis al ĉiuj monaĥinoj amuzi la ĝeneralulojn, pro la morgaŭa festo.

« Ĝi estos via kristnaska festeno », diris, ridante, la superulino al fratino Maleno.

Kaj tuj la bona fratinetino intencas kiel eble plej bone amuzi la dekduon da ĝeinfanetoj alkalkulitaj al sia gardo.

Je la komenco de tiu antaŭkristnasktaga klaso, oni alkondukis al la dolĉa fratino novan lernanton, knabeton trovitan sur la strato, sub la griza decembra ĉielo, malfeliĉan malriĉuleton, al kiu oni donis manĝaĵon en la manĝoĉambrego.

Fratino Maleno, karesante, al li demandis pri lia nomo, kaj, la infano, malsovaĝigita de tiu dolĉa kreitaĵo, murmuretis:

— Emanuelo.

Ŝi sidigis lin sur la unuan benkon, meze, ĉe la honoran lokon, kaj elparolis:

— « En la nomo de la Patro, kaj de la Filo.... »

Ĉiuj infanetoj rediris kune: « En la nomo de l' Patro, kaj de l' Filo, kaj de l' Sankta Spirito... »

Ne atendente, kiel kutime, unu el la infanoj daŭrigas sole, kaj laŭte:

— « Patro nia kiu estas en la Ĉieloj.... »

Ĉiuj kapetoj turniĝis al la juna maltimegulo kiu elparolis tiujn-ĉi tiel neatenditajn vortojn.

Sed Emanuelo, ĉar estas li, daŭrigas nekonfuzigita, meze de la ridetoj, la miroj kaj la signoj de siaj kunlernantoj.

Fratino Maleno faris geston. Nun la novulo daŭrigas sian preĝon meze de ĝenerala silento. Li preĝas la « Patro Nia », la « Saluton Maria » kaj komencas la « Mi kredas en Dio » ne ankoraŭ ellernitan de la ĝeknabetoj. La bona fratino miras. Emanuelo finis la lastan preĝon; tiam, la monaĥino rigardante lin afable:

— « Ĉu vi povas legi? Ŝi demandas al li, malice.

Emanuelo ĝentile jesas per klino de sia blonda kapo.

— Do, legu.

Fratino Maleno prezentas al la infano, sian libron: « La orumita Legendo » el kiu ŝi intencas rakonti kelkajn piajn fabelojn al la infanetoj.

Emanuelo legas bonege. La monaĥino aŭskultas lin, la tuta klaso aŭskultas.

Ĉiuj okuloj estas fiksitaj sur la malgrandulon kiu legas kiel grandulo kvankam li nur estas kvinjara. Emanuelo legas rakonton; la silento estas kompleta ĉirkaŭ li. Li legas duan rakonton; estas tiel kviete en la klaso kiel ĉe la montra fenestro de statuotendisto Apenaŭ, de tempo al tempo, oni aŭdas la ŝovadon de la rozario de fratino Maleno kontraŭ ŝia robo. Tamen pikite de sciivoleco la fratino haltigas la mirindan leganton:

— « Ĉu vi ankaŭ skribas? »

Post alia jeso, ŝi donis al li kraĵonon alligatan al sia zonuĉo; kaj sur la unuan paĝon de la libro, Emanuelo ekskribas per lirina maneto.

Je tiu-ĉi momento, iu dolĉe, trapis ĉe la pordo de l'klaso de fratino Maleno.

— « Sed, fratino mia », elparolas voĉo tra la malfermita pordo, « ne estas eble ke vi ankoraŭ vidas; de longa tempo mi ekbruligis la lumilon. Estas tuj la kvara, Neĝas. Vi devus elirigi la ĝeinfanojn. »

Fratino Maleno miras pro tiu voĉo elveninta el la apudesta klaso.

Vere, ĉirkaŭ ŝi, subite la nokto fariĝis; kaj, jen la ĝelernantetoj malkvietaj, timiĝigitaj, moviĝas en la mallumo dum ŝia mallerta mano serĉas la gasflamingon:

Jen la gaslampo ekbruligas kaj brilas sur la ĉeestantaj infanoj kiel ora papilio.

Maneto redonas al la fratino fermitan libron, alia maneto, la, sur la benko troviĝantan, kraĵonon.

La monaĥino serĉas per siaj okuloj la malgrandan Emanuelon... Ŝi ne vidas lin. Sur siaj fingroj ŝi kalkulas la nombron de siaj ĝelernantoj. Dek-du ili estis... kaj, poste; ili estis dek-tri...

Tiu-ĉi okazintaĵo malkvietigas fratinojn

Malenojn, dum ŝi al la pordo atkondukas siajn ĝeinfanojn.

Sed, subite, ideo al ŝi alvenas: tiu knabo ion skribis... Kaj, en la vestibulo, tute malkviete, ŝi mallermas la libron.

Sur la unua blanka paĝo, ĝuste antaŭ la titolo, la fratino legas tiujn-ĉi vortojn skribitajn en oraj literoj bonege formitaj:

« Mia ĝojo estas esti ĉe la filoj de l'homoj »

POL DE MADE.

El « Un peu de bon français »

Esperantigis LEONA SOLVYNS.

Letero de la Prezidanto de I. K. U. E. al S' Heidental, Redaktoro de « Belga Katolika. »

Institut S-Louis,

Bruxelles, 17-11-1911.

Kara Amiko en Kristo.

Mi plezure legis en la lasta Bulleto de nia « Belga Katolika Esperantista Ligo » ke vi fondis Centran Esperantistan Olicejon sub la titolo de « Zamenhof », por faciligi la vendon de libroj, ĵurnaloj, kaj ĉiuspecaj esperantaĵoj en Belgujo.

Jen instituto nepre necesa en nia lando! Malgraŭ la granda progreso de Esperanto en Belgujo dum la lastaj 4 jaroj, la belgaj esperantistoj ĝis nun ne trovas libristojn aŭ olicejojn en la tuta lando al kiaj ili povas sin turni por havigi *tuj* kaj *certe* eĉ la plej necesajn propagandilojn, insignojn k.t.p.

Ĉar mi konas viaŭ ageman karakteron, ĉar mi spertis ekzemple ke, dank'al via praktika laboremecc, kaj al via majstra redakcio de tiu interesa ĵurnalo « Belga Katolika », nia Ligo, kiu ĝis majo 1911 ekzistis nur nome, dum la spaco de 6 monatoj iĝis unu el la plej gravaj naciaj Ligoj de la I. K. U. E., havante pli ol 150 membrojn; pro tio, mi kuraĝas esperi ke via Centra Esperanta Olicejo havos similan sukceson.

Mi, do, ne nur promesas al vi, onla estontece, mendi miajn librojn kaj esperantaĵojn ĉe vi, anstataŭ skribi al fremdaj libristoj, sed plie, mi ja konsilas al ĉiuj miaj ĝeamikoj en

Belgujo, sekvi mian ekzemplon, kaj sin turni al vi por ĉiuj siaj mendoj.

Mi ne dubas ke, pro via akurateco kaj atableco, vi neprekontentigos viajn klientojn, kaj tiel, plenumos servon kiun ni de longatempe bezonis.

Ĉu mi kuraĝus sugesti ke en ĉiu N^o de la *Bulteno* vi bonvolus sciigi al ni la progreson de la « Zamenhof », kaj aldoni liston de la plej noveldonitaj libroj?

Akceptu, Kara Amiko, la certigon de mia plej granda estimo en Jesu kaj Maria.

AUSTIN RICHARDSON, L. K.
Prezidanto de la I. K. U. E.

Grava Avizo.

Ni memorigas al la membroj de nia « Belga Katolika Esperantista Ligo » ke je la 1^a de Januaro 1912 komencos la duan jaron de nia nacia Ligo. Kelkaj anoj jam pagis la kotizajon por 1912.

Al la aliaj ni permesas al ni prezentigi per la poŝto kvitancon je fr. 1,10 kun la nova membrokarto por 1912.

LA SEKRETARIO-KASISTO,
L. HEIDENDAL.

ESTAS MALFERMITA POR LA JARO 1912
ABONO AL LA GAZETO

« LA ONDO DE ESPERANTO »

(laŭ la adreso: Moskvo, Rusujo, Tverskaja, 26).

Dum la IV-a jaro de sia regula funkciado « La Ondo » senpage donos al siaj abonantoj, krom 12 n-roj (16 - 20 paĝaj) la speciale por tiu celo tradukitan de s-ino M. Sidlovszkaja ĉefverkon de rusa literaturo:

« Princo Serebrjanij » de TOLSTOJ.

(352-paĝa, grandformata librego, kies prezo por la neabonantoj estos aŭ frankite Sm. 1,60).

Literat. konkursoj kun monpremioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Beletristiko origin. k. traduk. Plena kroniko. Bibliografio. Amuza lako. Korespondo tutmonda (poŝtk. ilustr).

La abonpagon (2 rubl. = 2,120 Sm.) oni sendu al « Librejo Esperanto » (26, Tverskaja, Moskvo, Rusujo) aŭ al aliaj Esper. librejoj, poŝtmandate, respondkupone, papermone aŭ per bankĉekoj.

JUS APERIS:

FABIOLA

RAKONTO PRI LA KATAKOMBOJ, DE KARDINALO WISEMAN, TRAD. E. RAMO
Dika volumo in-8, 427 paĝoj. Prezo: Sm 1,40 (fr. 3,80).

Tiu libro prezentas interesan studon pri la moroj de la roma socio kaj pli speciale de la kristanoj en Romo je la fino de la kvara jarcento. Kun tiu historia priskribo, la aŭtoro miksis intrigon, kiu ĝin vivigas.

Ĉirkaŭ Fabiola vivas krudaj paganoj, kiuj pli kaj pli inspiras al ŝi malestimon kontraŭ la kristanaj dioj; tre klera, ŝi tralegis ĉiujn volumojn de famaj filozofoj, sed neniam trovis en ili kontentigon; restas en ŝia animo, peza dubo pri la gravaj problemoj de la mistera universo, de la nekonata celo de la vivo.

Kristanajn doktrinojn ŝi malmamas kaj konsideras kiel amason da ridindaj kaj malnoblaj superstiĉoj, pri kiuj ŝi *valas* absolute nenion scii. La tuta intereso de la rakonto konsistas do en tio: kiel ŝi grade proksimiĝos al la nova religio?

Tion kaŭzas la ekzemploj donataj ĉirkaŭ ŝi de noblaj karakteroj, kies kristanecon ŝi ne scias: Agnes, ŝia kuzino, ekzekutata en sia dekkvina jaro pro fideleco al la kredo; Sebastiano, la brava oficiro de la imperiestra gvardio, kiu ne timas konfesi al sia mastro, ke li estas adepto de la nova doktrino; kaj precipe Sira, la orienta sklavinio, kiu konigas al Fabiola la kristanajn instruojn, kaŝante nur ilian nomon. Jam tre emigita al tiu alta, neniam predikita filozofio, la fiera roma patriicino konvertiĝas, post kiam la fidela Sira ŝin savis de mortigo.

Kion diri pri la stilo? Ni ne bezonas prezenti al la amantoj de bona Esperanta literaturo ja tradukinton de « Dankon », « Kredo kaj Scio », « Eĉ en doloro ni estu ĝojaj » kaj ĉefe « En Svislando ». Tia verko estas nova pruvo pri la rezultato, kiun talenta uzanto kapablas tiri el la klasika Fundamento Esperanta. La libro meritas esti ĉie legata kaj diskonigata, ĉar ĝi fortigos nian fidon en la valoro de nia lingvo.

Tiu belega libro estas havebla ĉe

« La Centra Katolika Esperanta Oficejo « Zamenhof »

EN ARENDONK.

Niaj anoj de la

BELGA KATOLIKA LIGO

devas nepre havi la novan

Præglibron

« SPIRITA JUVELARO »

Kaj la intersplenan tradukon

per Ramo

de

FABIOLA

Mendu ilin tuj ĉe la Centra Katolika Esperanta Oficejo

Zamenhof -- Arendonk.

INTERNATIONAL CORRESPONDENCE EXCHANGE.

(I. C. E.)

Monata ĵurnalo enhavanta artikolojn en Esperanto kaj en diversaj lingvoj. Organo por la interŝanĝo de poŝtmarkoj, kaj korespondado per ĉiuj lingvoj. la Abono — frk. 2.50 jare. (1 Sm.) Oni sin turnu al la Redakcio: Avenue du Moulin, 16, Forest-Bruxelles.

PROPOŬOJ POR INTERKORESPONDADO.

Oni petas la korespondantojn jam cititajn, kiuj ne plu deziras korespondi, tion sciigi al la Redakcio kiel eble plej baldaŭ.

N. B. Estas devo je honoro respondi al ĉiu korespondanto almenaŭ unufoje.

S^{ro} Bernardo M. Serra, C. O. P. de Villaforta. Vich. Hispanujo.

S^{ro} Vidikvoski, 2833, Livingston St Philadelphia, Usono.

S^{ro} G. Van Oijen, 76, Engelenburgstraat, Den Haag, Nederlando.

S^{ro} O. Tromm, 14, Schulstrasse, Charlottenburg, Germanujo.

Pastro G. Saccardi, Castalpino, Sienna. Italujo.

Pastro Risto M. Popovich-Cupick, Danolovgrad, Montenegro.

S^{ro} Methodi Therzianoff, Macedona librejo, Sofia, Bulgarujo.

S^{ro} Trajč'e Ĉakarevic, Lyceo Imperia, 302, Uskub, Turkujo.

S^{ro} J. Mendrkrevič, Doktoro, 52, Długa Str. Krakovio, (Aŭstrio).

S^{ro} A. B. Seitov, 36, Uĉelnaja Omsk, Azia Rusujo.

S^{ro} J. Merino, Berabea, Argentina Respubliko.

La membroj de la Grupo « Zamenhof », sin turni al S^{ro} Richardson, 121, Rue du Marais, Bruselo.

La membroj de la Grupo « Antaŭen », sin turni al la Prezidanto S^{ro} E. Baez, Montenegro Strato, 13, Bruselo.

S^{ro} Lambert Dederichs 53, Rue des 4 vents, Bruselo.

Pastro Decoene, Roman Catholic Church, Brandon (Man.) Canada. Povas nur doni adresojn, ne persone korespondi.

S^{ino} Doktorino Biske, por la Grupo de Spa, Hôtel de la chaîne d'or. Povas doni multajn adresojn.

Rekomendindaj Firmoj

Sinjoro Leo DE COENE-HAUTEKEETE, Rue Savary, Courtrai.

Fadenoj — Stupoj — Kotonoj spinataj k. t. pl. — Oni parolas Esperanton.

Notariejo de Sinjoro ROSSAERT, Courtrai.

Pension-Lernejo por Fraŭlinoj. « Les Dames de Saint-Nicolas » Courtrai kaj Dixmude. Oni petu prospekton al la Respektinda Superulino.

Strumpajoj: ESPERANTISTOJ, aĉetu ĉiam ĉe la bonkonata firmo Soj. MATHIEUX kaj Filoj: 49, Marché aux Poulets, BRUSELO. Delegito por Belgujo de U. E. A.

Sinjoro VERHAUT, Presisto en Courtrai.

LIBREJOJ Esperantistaj

A. J. Witteryck, Presisto-Eldonisto, Brugge.
Spineux & C^o Rue du Bois Sauvage, Bruxelles.
Belga Esperanta Oficejo, Vondelstraat, 20, Antwerpen.
Franca Esperanta Oficejo, Rue d'Angoulême, 20, Paris.
A. N. Govers, Westeinde, 6, Den Haag.

HOTELOJ

COURTRAI: « Hôtel du Nord » Je la stacidomo, Kunvenejo por Esperantistoj.

Au Moulin d'or, Rue d'Assaut, Bruxelles. Esperanta Kunvenejo.
Hôtel Louis Le Grand 2, Rue Louis le Grand, Paris. En beleg *
apud avenue de l'opéra.

Hôtel Métropole, Brussel.

La plejgranda hotelo en Belgujo, 500 ĉambroj kaj 150 ĉambraroj kun banejoj.

Omi parolas Esperante.

LONDONO: Tre rekomendinda kaj komforta, vere « ESPERANTA-HEJMO ».
Sinjorino O'Connor « Esperante House », 17, St. Stephens Square, Bayswater
London, W. Tre moderaj prezoj.

EKSPED-AGENTEJO

THOS COOK & SON.

LUDGATE CIRCUS

LONDON

Filioj tra la tuta mondo